




Norvega Esperantisto

ESPERANTOBLADET

N-ro 5/6
1965

ORGANO DE NORVEGA ESPERANTISTA LIGO
ĈEFREDAKTORO: JOHAN HAMMOND ROSBACH

3-a periodo
31-a (37-a) jaro
Monata



SIMBOLA ALIĜO AL TOKIO

Multaj esperantistoj, kiuj kutimas regule vizitadi la Universalajn Kongresojn, kiuj ne havas okazon partopreni la 50-an en Tokio, sed tamen plenkore aprobas ke fine okazu U.K. en Azio interesiĝas pri ĝi kaj volonte subtenas ĝin. Aliflanke, tiu ĉi Kongreso, memkompreneble, kaŭzas multajn eksterordinarajn elspezojn, tiel ke malgraŭ la kontentiga aliĝado ĝia financa situacio estas ege malforta. Tial, kaj por doni al nepartoprenontoj la eblecon tamen ligi sin al la Kongreso, kaj por helpi al la financoj de tiu ĉi unika Kongreso, starigita estas

SIMBOLA ALIĜO AL LA 50-a.

Tiu, kiu aliĝas simbole, pagas 25,— gld. (100 steloj), ricevos specialan

kongresan karton kaj siatempe ricevos memoraĵon. Koncerne tion oni povas elekti: aŭ la Kongresan Libron, aŭ samvaloran artan japanajon. Aliĝante, oni tuj indiku kiun donacon oni elektas (en kunligo kun la presigota kvanto de la Kongresa Libro).

La kotizon de 25,— gld. aŭ egalvaloro oni sendu rekte al


la Officejo de UEA,
Nieuwe Binnenweg 176,
Rotterdam, Nederlando,
poŝtĉekkonto 378964,
bankrilato R. Mees & Zoonen,

aŭ al la konataj adresoj de ĉefdelegitoj kaj perantoj.

★ ★

Simbole aliĝu al la 50-a!

Nordlanda Esperanto-Kongreso



en Oslo
19/6-22/6
1965

INFORMILO 6

Jen la *lastaj* sciigoj de la Loka Kongresa Komitato:

1. *Aliĝoj*: Ankoraŭ ni povas havigi hotelĉambrojn por partoprenantoj, sed post la 1-a de junio ni ne povas garantiĝi enloĝadon. Tial ne atendu kun via aliĝo, sed anoncu vin tuj!

2. *Enloĝado ĉe privatuloj*: Ni ne plu povas akcepti enloĝadon ĉe privatuloj, sed havas sufiĉe da litoj pretaj en Studenta hejmo je moderaj prezoj iom for de la urba centro. La ŝtata enloĝada organizo (situanta en Orienta Stacidomo) akceptas nur mendojn por vojaĝantoj alvenintaj la saman tagon, por enloĝado private.

3. *Akcepto*: Krom la esperanto-oficejo en la kongresejo (urba Universitato, Karl Johansgate 47, Oslo) oni trovos esperanto-parolantajn helpantojn en Orienta Stacidomo kaj en la haveno kie alvenas la ŝipoj el eksterlando.

4. *Ŝanĝo de mono*: Bankaj ŝanĝejoj troviĝos en tri lokoj: En kongresejo, en Orienta Stacidomo kaj en la Studenta Urbo en Sogn (eksterurba universitato kun Studenta Hejmo), ĉiuj pretaj por la kongresanoj.

5. *Kartoj*: Ĉiuj partoprenantoj ricevis senpage kartojn pri Oslo, pri Norvegujo kaj en la kongresa libreto troviĝos skizoj pri la diversaj kunvenejoj, ĉio disdonebla ĉe alveno al la kongresejo.

6. *Komuna fotografado*. Okazos Dimanĉe la 20-an de junio je la 9.30 matene antaŭ la kongresejo (Universitata ŝtuparo).

Kaj fine: **KORAN BONVENON** al Oslo, la ĉefurbo de Norvegujo!

LA LOKA KONGRESA KOMITATO

Nova glumarko

Speciala glumarko estas eldonita de Universala Esperanto-Asocio okaze de la Jaro de Internacia Kunlaboro. La glumarkoj estas aĉeteblaj ĉe la Centra Oficejo de UEA, je la prezo: 0,40 gld. (1,6 steloj aŭ 1 rpk.) por ĉiu folio de 10 markoj. La kutimaj rabatoj estas donataj al mendantoj de minimume 20 folioj.

Ni varme rekomendas al vi larĝan distribuadon de tiu ĉi glumarko dum la tuta jaro 1965.

Kun koraj salutoj,

M. H. Vermaas
direktorino C. O.

ESPERANTO OFICIALE AGNOSKATA EN ĈEĤOSLOVAKIO

Dum februaro 1965 estis oficiale starigita nova Ĉeĥoslovaka ESPERANTO KOMITATO, kiu estas konsila organizaĵo de ĉeĥoslovaka ministerio por instruado kaj kulturo. Per dekreto de la ministro estis nomigita la prezidanto — samideano František Sviták, iama longjara sekretario de Esperantista klubo en Praha. Dum sia fondiga kunveno, kiu okazis en la urbo Brno, la *Ĉeĥoslovaka Esperanto Komitato* akceptis laborplanon por la jaro 1965 kaj la rezolucion pri ĉefaj taskoj de Esperanto-movado en Ĉeĥoslovakio.

Norvega Esperantisto

ESPERANTOBLADET

Ĥeaaakcio: Johan Hammond Rosbach,
Hans Amund Rosbach

Adreso de redakcio: Boks 942, Oslo
Abonprezo: En Norvegujo kaj eksterlando: n. kr. 8,—.

Anoncprezoj: 1/1 paĝo kr. 150,—
1/2 p. kr. 75,—, 1/4 p. kr. 38,—
1/8 p. kr. 19,—.

Nova oficejo!

Fine NEL. ekhavis pli grandan oficejon! Ĝi konsistas el du ne tre grandaj ĉambroj kaj situas en St. Olavsgt. 27 III, Oslo. Kredeble ni translokiĝos tien en la daŭro de Majo.

Sed ĝi ne estas malmultekosta: kr. 200 monate + elektron. Tamen la Liga Estraro trovis ke ĝi devas akcepti, ricevinte la okazon. La ĝisnuna situacio estis neeltenebla.

Nun ni trovas necese apelacii al la donacemo de la membraro. Dum la lastaj jaroj sufiĉis la malgrandaj donacoj, kiujn ricevis la kontorfondiĝo. Nun ni estas devigitaj peti al ĉiuj, kiuj havas okazon, bonvolu helpi per donacoj por teni la oficejon. Kelkaj estraranoj jam anoncis eĉ monatajn kontribuadojn.

Karaj membroj! NEL. estas vi, kaj la oficejo de NEL. estas via oficejo. Kiam ni nun havos pli grandan lokon, ni povos labori

multe pli efike por nia afero. La estraranoj estas pretaj fari la laboron, se ni nur ricevos la necesan ekonomian helpon por daŭre luadi la novan oficejon.

LA LIGA ESTRARO

Sciigoj de N.E.L.

Kurso dum la aŭtuno. Kiel montras la jarraporto de N.E.L. (vidu en la pasinta numero), la membronombro ne kreskis, sed kontraŭe daŭre montras tendencojn iom malkreski. La kaŭzo ne estas eksterordinare multnombra eksigado, sed tro malgranda kursagado, tiel ke la aliĝado de novaj membroj ne sufiĉas por kompensi la naturan perdadon. *Tio devas ne daŭri!* La Estraro de N.E.L. tial substrekas ke estas nepre necese ke senescepte ĉiuj kluboj kaj laŭeble multaj el la rektaj membroj starigos kursojn dum la venonta aŭtuno. Nur per kursarangoj oni povas kreskigi la membraron de la kluboj kaj fondi klubojn en novaj lokoj. Utiligu la intereson, kiu evidente ekzistas, aŭ estas krebela, i.a. pro la efiko de la fervojista kongreso okazinta en Hamar en Majo kaj la Nordlanda Esperanto-Kongreso en Oslo en Junio. N.E.L. estas preta helpi per kursmaterialo kaj konsiloj. Kie neniu loka samideano povas gvidi kurson, oni klopodu fondi studrondon por komencantoj per la koresponda kurso. Krome oni klopodu igi lokan gazeton publikigi la gazetkurson (skribu al NEL. pri plano kaj provleciono). Sed komencu jam nun prepari la aŭtunajn kursojn!

Taskotabelo por la kluboj. —
Junio: La estraro planas la aŭtunan laboron kaj precipe decid-
 as detalojn rilate la aŭtunajn
 kursojn.

Julio: Antaŭ la 15a la sekretario
 sendas al N.E.L. (kun kopio al la
 distrikto) raporton pri la 2a jar-
 kvarono kun studraporto pri la
 la jarduono dorsflanke (blanko-
 edo A 10/E 1).

Aŭgusto: Estrarkunveno planas
 la kunvenojn de la venonta mo-
 nato. La estraro zorgas pri kurs-
 ejo kaj kurspropagandilo.

Septembro: La kursoj komenciĝ-
 as. La studgvidanto refunkciigas
 la studrondojn kaj fondas novajn.
 Estrarkunveno planas la kunven-
 ojn de la venonta monato.

La Liga Estraro.

Al ĉiuj agemaj esperantistoj

LIGUE FRANCAISE «Pro UNESCO»
 (franca asocio de amikoj de Unesko),
 interkonsente kun la Centra Oficejo
 de Universala Esperanto-Asocio, el-
 donas novspecan kaj efikpromesan
 Esperanto-propagandilon, kvarlingv-
 an, malmultekostan (eventuale eĉ
 senkoston), amase disvastigeblan en
 la tuta mondo.

Tiu nova, diverslande uzebla Esper-
 anto-propagandilo povas facile esti
 metata en leterojn (por enlandaj kaj
 eksterlandaj ricevontoj), en leterkest-
 ojn, en atendejojn (ĉe kuracistoj,
 dentistoj, ŝtacidomoj, k.a.), en turism-
 oficejojn, junul-gastejojn, vendejojn,
 kontorojn, aŭtobusojn, trajnojn, ktp.,
 kaj ankaŭ esti disdonata senpere al
 lernejoj, studentoj, gastoj, pasant-
 ojn, turistoj, kongresanoj, vizitantoj de
 muzeoj kaj foiroj, ktp.

La jena apartaĵo estas speciale
 menciinda: Sur la kvara paĝo de la
 Esperanto-propagandilo estas rezerv-
 ita spaco, enkadrigita, por doni al vi
 la eblecon surstampi (aŭ surprisigi)
 vian adreson aŭ tiun de la loka Es-
 peranto-grupo. Krome, ni varme re-
 komendas al vi, proponu al firmoj de
 via urbo (industrioj, hoteloj, restora-
 cioj, bazaroj kaj diversspecaj komerc-
 istoj) uzi la propagandilon kiel okaz-
 an reklamportilon; kontraŭ pago de
 la pres-kostoj de 3000 ekzempleroj,
 aŭ pli, nia presisto senpage surpris-
 igos la firmo-adreson en la rezervitan
 spacon.

Se ĉiuj agemaj esperantistoj metode
 kaj persiste eluzos ĉi tiun interesan
 apartaĵon, ni povos iom post iom
 presigi tre grandan kvanton de la
 nova Esperanto-propagandilo (en di-
 versaj lingvoj), tio kio donos la ebl-
 econ individue kontakti centmilojn,
 eĉ milionojn da nuntempuloj, kiuj,
 ĝis nun, aŭ ne atentis la sporadajn
 gazetartikolojn pri nia movado, aŭ eĉ
 ankoraŭ nenion aŭdis pri la internacia
 lingvo Esperanto.

Prezo: 1000 ekzempleroj (unua milo):
 39 F.F. (aŭ egalvaloro), plus 10 % por
 la sendkostoj. Ĉiu plia milo: 29 F.F.

B. THAILLET

24 faubourg de Riedisheim
 Mulhouse (Francujo)

5-kronrulado al la Informfondaĵo de NEL.

Listo 7:

| | |
|------------------------------|---|
| Frithjof Lettenstrøm, Halden | |
| Christ. Hanson, Skudeneshavn | |
| D. Mjøllhus, | » |
| O. M. Wikre, (kr. 10,-) | » |
| Johs. Mjøllhus, | » |
| Björg Torkildsen, | » |
| Ole Tandstlett, | » |
| K.S.K. (kr. 20,-) | |

Entute 8 pagintoj.

Alvoko de la estraro de UEA al la esperantistaro

Dum la Printempa Kunsido, okazinta
 en la Domo de UEA en Rotterdam de
 la 20-a ĝis 22-a de aprilo, la Estraro
 de Universala Esperanto-Asocio pri-
 traktis, inter multaj aliaj aktualaj
 demandoj, ankaŭ la membronombron
 de la Asocio, la financan situacion,
 la agadon Afriko-Azio kaj la progres-
 adon de la kampanjo okaze de la Jaro
 de Internacia Kunlaboro.

En ligo kun la diskuto pri tiuj
 punktoj ni decidis turni nin al la
 esperantistaro kun la sekvantaj petoj:

1. En 1964 UEA havis entute 32 202
 membrojn, el kiuj nur 7154 estis in-
 dividuaj membroj en diversaj kate-
 gorioj. Tio signifas, ke nur iom pli ol
 kvinono de la tuta membraro estis
 rekte internacie ligita pere de la
 publikaĵoj de la Asocio. Tiu nekon-
 tentiga rilato reflektiĝis ankaŭ je la
 financa situacio, ĉar la esencaj el-
 spezoj por la multnombraj necesaj
 agadoj superis kaj plue superas la
 enspezojn. Principe ekzistis sole tri
 eblaj solvoj: aŭ malgrandigi la aktiv-
 ecojn, aŭ altigi la kotizojn paralele
 kun la ĝenerala altiĝo de la vivkostoj,
 aŭ pligrandigi la nombron de la in-
 dividuaj membroj.

Fidante je la esperantista konscio ni
 unuanime akceptis la trian solvon. Ni
 do evoluigos ĉiujn ĝisnunajn agadojn,
 kvankam la kotizoj restos samaj, sed
 ni devas altigi la nombron de mem-
 broj je minimume mil pliaj individu-
 aj, precipe en la kategorioj MA aŭ
 J-MA. Tial ni petas ĉiujn ĝisnunajn
 individuajn membrojn pagi tuj sian
 kotizon kaj varbi kiel eble plej mult-
 ajn novajn MA. Ni plue petas ĉiujn
 esperantistojn, kiuj ankoraŭ ne estas
 individuaj membroj, aliĝi al UEA kiel
 membroj-abonantoj aŭ junaj mem-
 broj-abonantoj. Per tio la aliĝintoj
 ne nur rekte ligiĝos al la internacia

movado, ĝuos ĉiujn avantaĝojn de
 individua membreco, sed ankaŭ hel-
 pos al la plua fortikigo de la monda
 organizaĵo, al ĝia multflanka utila
 laboro kaj al la solvo de la financa
 problemoj.

2. Dank' al la agado Afriko-Azio
 Esperanto komencis disvastiĝi en
 pluraj landoj de tiuj du kontinentoj.
 Tamen, plej ofte, pro valutaj kaj aliaj
 malfacilaĵoj estas maleble pagi la
 kotizojn el diversaj evoluantaj land-
 ojn. Por solvi tiun problemon kaj helpi
 al la plua disvastiĝo de Esperanto en
 Azio kaj Afriko la Estraro decidis
 utiligi la Fondaĵon Prof. Canuto por
 pagi la kotizojn de membroj-abon-
 antoj, junaj membroj-abonantoj aŭ
 membroj kun jarlibro por sindonaj
 esperantistoj unuavice en la evolu-
 antaj landoj de la du kontinentoj, se
 la donacinto ne indikis eksplicite la
 personon, kiun li aŭ ŝi deziras mem-
 brigi. La estraranoj, la direktorino de
 la C.O. kaj la redaktoro de la revuo
 «Esperanto» tuj kolektis mem inter
 si donacojn al la Fondaĵo por mem-
 brigi 17 MA, kaj 6 J-MA. La Estraro
 ankaŭ decidis transigi el la Propa-
 ganda Konto 5000 gld. al la Fondaĵo
 Canuto por la sama celo. Tio, kune
 kun la antaŭe kolektitaj sumoj, ebl-
 igas la pagon de entute 291 kotizoj
 MA, 6 J-MA kaj 1 MJ. Ni apelacias
 al ĉiuj pli bonstataj esperantistoj, ki-
 ujn komprenas la gravecon de tiu paŝo
 por la plua disvastiĝo de Esperanto
 en Azio kaj Afriko abunde kontribui
 al la Fondaĵo-Canuto.

3. La kerna ero en la granda agado
 okaze de la Jaro de Internacia Kun-
 laboro estas la Propono prezentota al
 Unuigintaj Nacioj fine de la jaro 1956.
 UEA jam distribuis ĉ. 200 000 foliojn
 kun la teksto de la Propono. Ĝis la
 22-a de aprilo envenis en la Centran

Oficejon de UEA en Rotterdam pli ol 100 000 individuaj subskriboj kaj kolektivaj subskriboj de precize 411 organizaĵoj kun entute 5638 000 membroj. La folioj ĝis nun venis nur el 43 landoj, kio signifas, ke el aliaj kvardek landoj, en kiuj UEA havas membrojn, ne alvenis eĉ unu folio.

Dankante al ĉiuj kiuj kontribuis al la ĝisnunaj rezultoj, la Estraro petas ĉiujn intensigi ĝis maksimumo la kampanjon por la kolektado de subskriboj kaj plenumi ankaŭ la aliajn erojn de la Laborplano por la Jaro de Internacia Kunlaboro. La Estraro ankaŭ petas regule sendadi la subskribitajn foliojn al la C.O. de UEA en Rotterdam, tiel ke ne amasiĝu tro da materialo en la finaj monatoj de la kampanjo.

Apenaŭ necesas atentigi, ke de la sukceso de tiu ĉi gravega nova agado multrilate dependas la pluaj paŝoj, kiujn UEA intencas entrepreni en tiu ĉi afero. Krome, la kolektado de la subskriboj donas unike taŭgan okazon por vasta objektiva informado pri la Internacia Lingvo, por instigado al lernado, varbado de novaj membroj kaj ĝenerale por fortikigo de la pozicioj de la Internacia Lingvo en la mondo.

Ĉiujn kotizojn kaj donacojn por la Fondaĵo Prof. Canuto bonvolu sendi al la ĉefdelegito aŭ peranto de UEA en via lando aŭ rekte al la Centra Oficejo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam, ĝirokonto 378964.

En la konvinko ke tiu ĉi alvoko havos vastan kaj efikan eĥon ni direktas al la tuta esperantistaro bondezirojn okaze de la Jaro de Internacia Kunlaboro.

Ivo Lapenna, Prezidanto
Erik Carlén, Vic-prezidanto
E. L. M. Wensing, Vic-prezidanto
Günther Becker, Ĝenerala Sekr.
André Albault, Estrarano pri Kulturaj Aferoj

Maurice Jaumotte, Estrarano pri Landaj kaj Fakaj Asocioj
Józef Toczyski, Estrarano pri Lernejoj Aferoj
E. J. Woessink, Estrarano pri Financoj

*

Jen la kotizoj por Norvegujo:
MJ kr. 20,-, MA, MA-K kr. 40,-, MS kr. 60,-, J-MJ kr. 10,- J-MA kr. 30,-
Oni pagas al la Ĉefdelegito de UEA, s-ro Alfred Skyberg, Østensjøveien 118 a, Oslo-Bryn; pĉk. 133.29.

Personoj ankoraŭ ne 22-jaraj povas esti

Juna Membro kun Jarlibro (*J-MJ*), kiu pagas 5,— gld. kaj ricevas la Jarlibron (unua parto printempe, dua parto aŭtune), aŭ
Juna Membro-Abonanto (*J-MA*), kiu pagas 15,— gld. kaj ricevas la Jarlibron, la monatan revuon «Esperanto», kaj la kvaronjaran junularan gazeton «Kontakto».

Personoj de 22 ĝis inkluzive 25-jaraj povas esti

Membro kun Jarlibro (*MJ*), kiu pagas 10,— gld. kaj ricevas la Jarlibron, aŭ Membro-Abonanto kun «Kontakto» (*MA-K*), kiu pagas 20,— gld. kaj ricevas la Jarlibron, la revuon «Esperanto», kaj la junularan gazeton «Kontakto».

Personoj pli ol 25-jaraj povas esti Membro kun Jarlibro (*MJ*), kiu pagas 10,— gld. kaj ricevas la Jarlibron, aŭ Membro-Abonanto (*MA*) kiu pagas 20,— gld. kaj ricevas la Jarlibron kaj la revuon «Esperanto».

Personoj, kiuj volas finance helpi la Asocion, povas fariĝi

Membro-Subtenanto (*MS*), kiu pagas 30,— gld. kaj ricevas la Jarlibron, la revuon «Esperanto», kaj (se li estas malpli ol 26-jara) la gazeton «Kontakto», aŭ Patrono (*Pat.*) kiu pagas 200,— gld. (dekoble la kotizon

de MA) kaj ricevas la samajn eldonaĵojn, kiel MS.

Dumviva membro (DM) pagas por la tuta vivo per unu fojo nur 20-oble la kotizon de MA, sendepende de eventualaj postaj kotizaltigoj. Li ricevas la Jarlibron, la revuon «Esperanto» kaj (dum li ankoraŭ estas malpli ol 26-jara) la gazeton «Kontakto».

Ĉiuj membroj, en kiu ajn kategorio, ricevas krom la menciitaj eldonaĵoj ankaŭ membrokarton kaj membro-markfolion (vidu la regularon pri la delegita servo en la unua parto de la Jarlibro).

Ĉiu ankaŭ povas aboni aparte la revuon «Esperanto» (15,— gld. jare), la junularan gazeton «Kontakto» (8,— gld. jare) kaj la kvaronjaran revuon «Monda Kulturo» (15,— gld. jare).

La Internacia Junlarkonferenco de la Anne Frankfondaĵo 1965

La Internacia Junlarkonferenco de la Anne Frankfondaĵo ĉiujare organizas konferencon. La celo de ĉi tiuj konferencoj estas intensigi pli bonan komprenigon inter junaj homoj de diferencaj nacioj. Ĝis nun tiuj konferencoj okazis nur en la angla lingvo. Por la unua fojo nun ankaŭ Esperanto estas allasita kiel konferenclingvo. Dependas de la sukceso de ĉi tiu konferenco, ĉu Esperanto estos daŭre aplikata en la laboro de la Anne Frankfondaĵo. Per ĉi tiu konferenco, kiu pritraktos la KOMUNIKADON, la fondaĵo volas kontribui sian eron al la Jaro de Internacia Kunlaboro speciale.

Por eviti tedajn, temporabajn tradukojn ktp., ni organizos la konferencon en 1965 dufoje: De la 19a ĝis

inkl. la 25a de julio ĝi okazos en la angla lingvo, de la 25a ĝis inkl. la 31a de julio ĝi okazos en Esperanto. La programoj estas paralele absolute samaj. Ambaŭ konferencopartoj partoprenos unu tagon kune (25. julio), por ke la anglolingvanoj post espereble fruktodona konferenco estu konfrontataj kun la praktika komunikado inter diverslingvanoj nesciantaj la anglan.

LA PROGRAMO aspektas jene: (M: mateno, P: Posttagmezo, V: Vespero)
DIM. 25. julio M-diservoj; P-konvers. boatveturado; V-interkonatigo.
LUN. 26. julio M-oficiala malfermiĝo, kariljono; P-libera, V-la prelego.
MAR. 27. julio M-2a prel.; P-enurba ekskurso; V-filmoj.
MER. 28. julio M-ekskurso al Tropika Instit.; P-3a prel.; V-koncerto.
JAU. 29. julio M&P-tuttaga ekskurso; V-libera.
VEN. 30. julio M-4a prel.; P-libera; V-kultura vespero.
SAB. 31. julio M-5a prel.; P-forumo; V-distra fermiĝa vespero.

Por la prelegnumeroj vidu la 2an folion. Ĉiu prelego estos sekvata de diskuto. La forumo enhavos superrigardon, konkludon, planojn.

KOTIZOJ: ĝis 1. jul. 1965 f. 100,—. La kotizo inkluzivas loĝadon, kompletan pensionon kaj ekskursojn dum la konferenco. La partoprenontoj loĝos en la propra hotelo. La aĝlimo estas de 18—30 jaroj. Aligu frue por certigi al vi hotelreserviĝon! Post la 30a de junio 1965 ni je nia bedaŭro ne plu povos akcepti aliĝojn. Nur aliĝiloj, de kiuj ni ricevas la kotizon, povas esti traktataj. Por gejunuloj el nepagipovaj landoj specialaj reguloj. Komprenoble ni ĉiam pretas providi vin je kromaj informoj petataj.

ANNE FRANK-DOMO,
Prinsengracht 263,
Amsterdam — C.

50-a Universala Kongreso de Esperanto

Tokio 31/7 — 7/8 1964

Sub la Alta Protektado de D.ro Yuji Shibata,
Prezidanto de la Japana Akademio

LOĜIGA SERVO

La loĝiga Servo de la Universala Kongreso atentigas, ke post la 30a de junio ne plu estos eble rezervi litojn. Sekve, la mendiloj, kiuj atingos la konstantan adreson de la Kongreso post la 20a de junio, estos resenditaj kaj la pagita makleroj repagita, minus 1,— gld. (4 steloj) pro elspezoj.

La nombro da litoj je dispono en la Kat. F (Komuna Loĝejo) estas jam elĉerpita. La 1-litaj ĉambroj ankaŭ ne plu estas liberaj. La kongresanoj, kiuj ankoraŭ ne mendis loĝejon, nepre indiku en kiu(j) kategorio(j) ili deziras loĝi, en kazo ke la kategorio mendita estas jam elĉerpita.

FOTO-KONKURSO

La personoj, kiuj ankoraŭ ne sendis la fotojn por la konkurso, bonvolu tion fari per aerpoŝto (presaĵe) kaj ilin sendi al: 50-a Universala Kongreso de Esperanto, Hongo 2—2—14, Bunkyo-ku, Tokio, Japanujo.

KARAVANOJ

Ĉiuj organizantoj de karavanoj bonvolu aerpoŝte informi la Lokan Kongresan Komitaton pri la precizaj tago kaj horo de alveno al Tokio kaj ankaŭ pri la nombro de la partoprenantoj. Nur laŭ tio estos eble aranĝi taŭgan akcepton ĉe la flughaveno.

INFANA KONGRESETO

Pro la nesufiĉa nombro da aliĝoj, LKK estas devigita rezigni je la okazigo de la 10-a Internacia Infana Kongreseto.

STATISTIKO

(ĝis 4/5-65): Alĝerio 1, Argentino 4, Aŭstralio 31, Aŭstrio 8, Bahamaĵ Ins. 2, Belgujo 9, Brazilo 9, Britujo 43, Bulgarujo 12, C.A.R. 1, Ĉeĥoslov. 1, Danlando 20, Finnlando 7, Francujo 93, Ganao 1, Germanujo 46, Hindujo 1, Hispanujo 7, Honkongo 2, Hungarujo 8, Irlando 1, Israelo 2, Italujo 41, Japanujo 821, Jugoslavio 10, Kameruno 2, Kanado 6, Koreo 3, Maroko 2, Meksikio 2, Monako 2, Nederlando 32, Norvegujo 11, Nov-Zelando 16, Pollando 36, Portugalujo 1, Rumanujo 1, Sovetunio 1, Svedujo 54, Svislando 12, Urugvajo 4, U.A.R. 1, Usono 60, Venezuelo 3. Entute 1430 el 44 landoj.

Bjørn Ottesen 80-jara

Estas nekredible, sed vere, la amatora aktoro, la «homo kun bonaj ideoj kaj surprizoj», Bjørn Ottesen, fariĝos 80-jara la 11an de Junio, ĉar li naskiĝis en 1885.

Bjørn Ottesen estas esperantisto de 1915, kaj estis prezidanto de la restarigita Klubo Esperantista en Kristiania 1916—1918, kaj poste dum diversaj periodoj li estis ĝia sekretario, vicprezidanto kaj prezidanto. Ankaŭ de N.E.L. li estis jen sekretario, jen estrarano, jen kasisto, jen revizoro. Li estis prezidanto de la antaŭkongresa komitato en Oslo en 1934 kaj ĝenerala sekretario de la L.K.K. de la 37a U.K. en Oslo en 1952. Sed plej konata li eble estas pro sia humora aktorado kaj petolado en la klubo en Oslo kaj kiel la «Majstro» de la klubo ordeno «La Verda Pantoflo». Tamen ĉio ĉi estas nur parto de la multaj taskoj kaj oficoj, kiujn li plenumis en la esperantista vivo en Oslo dum la lastaj 50 jaroj. Nun li estas honora membro de la klubo.

Okaze de lia jubileo ni sendas al li korajn gratulojn kun espero pri sano, forto kaj feliĉo. C. Støp-Bowitz

Instituto por Esperanto en komerco kaj industrio

Tiu ĉi Instituto, kiun ni nomu mallonge «EKI», oficiale starigis antaŭ proksimume unu jaro kaj jam disvastigis siajn kontaktojn tra la tuta mondo. Multaj petis informojn, kelkaj elstaraj Esperantistoj en diversaj landoj promesis aktive kunlabori kaj pluraj komercaj entreprenoj, unuopaj industriistoj ktp. pretis finance apogi la agadon de EKI.

La laborprogramo de EKI estas vasta, ampleksante diversajn kampojn de la ekonomia vivo. Sed unu el la plej urĝaj taskoj farendaj estas sendube la kompilo de moderna fakterminaro por komerco kaj industrio, kiu samtempe estu difina kaj poliglota. Pri ĝi okupas sin unuavice s-ro F. Munniksma, Amsterdam, tradukisto en granda nederlanda entrepreno, alte kvalifikita Esperantisto, kiun la Amsterdama tribunalo ĵurigis kiel tradukiston por Esperanto.

Tamen, EKI bezonas la moralan kaj finanĉan apogon de multaj, tre multaj industrioj, komercaj entreprenoj kaj firmoj se ĝi volas sukcesplene kaj efike realigi sian programon. Jam haveblas cirkuler-letero, konciza superrigardo de la EKI-laborprogramo kaj aliĝilo, presitaj en la lingvoj angla, franca, germana, itala, hispana, nederlanda, sveda kaj esperanta. — Pruviĝis ke sendistinga distribuo de tiuj paperoj al kiu ajn firma aŭ entrepreno ne multe efikas. Necesas ke la adresoj kontaktotaj estu antaŭe informitaj pri EKI kaj ĝiaj celoj. Tial EKI bezonas la kunhelpon de ĉiuj Esperantistoj, precipe de la fakdelegitoj por komerco kaj industrio, sed cetere de ĉiuj kiuj, en iu ajn maniero, kapablas, inter siaj komercaj rilatoj, prepari la terenon, substrekante la grandegan problemon de la hodiaŭa lingvoĥaoso en internaciaj komercaj

kontaktoj kaj atentigante pri la racia solvo kiun prezentas la ĝenerala enkonduko de Esperanto.

Per tiu ĉi alvoko la Estraro de EKI denove petas ĉiujn doni sian plenan subtenon al la Instituto, informante la Sekretariaton pri adresoj de komercaj kaj industriaj entreprenoj, kiuj eble simpatias kun la celoj de EKI kaj pretas esti ĝiaj apogantoj.

Nur dank' al la aktiva kunhelpo de vi ĉiuj, la grava iniciato pri la fondo de EKI povos baldaŭ fariĝi unu el la plej okulfrapaj sukcesoj de Esperanto en la praktika vivo.

Nome de la Estraro de EKI,
E. L. M. Wensing,
Aalsterweg 217,
EINDHOVEN (Nederlandoj)

Grava sukceso en la sveda parlamento

En la sveda parlamento 32 parlamentanoj subskribis proponon pri iniciato ĉe UNO: UNO zorgu, ke scienca komisiono esploru la eblojn kaj la neceson de unu internacia lingvo apud la naciaj lingvoj.

La celo de la propono kompreneble estas trovi la aŭtentan aprobon de tia internacia lingvo. Temas unuavice pri Esperanto, kies ŝancojn oni esploros laŭ la kontraŭmeto de la avantaĝoj kaj malavantaĝoj kompare al la angla lingvo, kiu estas nun plej aktuala kiel internacia lingvo.

Grave estas, ke la proponintoj apartenas al kvar diversaj politikaj partioj. Kompreneble nia amiko *Einar Dahl* komencas la liston de la nomoj en la unua ĉambro. Ambaŭ ĉambroj unuanime akceptis la proponon.

Oni ne tuj atendu el tio la finanĉan sukceson de Esperanto, eĉ ne en Svedujo. Sed oni vidas, ke la aŭtoritatoj komencas kompreni la tre akutan staton de la interlingva problemoj.

Fabloj de Andrés Fáy

Remoro pri honorinda antaŭulo

Antaŭ cent jaroj mortis Fáy András (Andreo Fai), hungara verkisto kaj vasthorizonta ekonomiulo, ano de la reformgeneracio klopodinta por la socia progreso. Multflanke li estis okupata en la publika vivo, sed plej klare montras lian karakteron la edukcelaj fabloj. Per ili li fondis sian verkistan nomon kaj tiuj estas liaj plej konataj verkoj. Ili aperis en du volumoj, kiuj enhavas 600 fablojn.

La fabloj enhavas la vivospertojn de Fáy. Cio, kion li vidis depost sia infanaĝo en la familia rondo, en la mondo de edukado, en la scienco kaj ofico. Liaj klarvidaj okuloj observis la agadojn de la homoj. Li spertis, ke estas en ni pli multe da malbono ol bono kaj per tiuj ĉi fabloj li intencis eduki tiujn, kiuj opinias, ke estas inde ilin legi.

— La ĝojon de la vivo, — li diris, — ni ne rifuzu, sed antaŭvide ni vivu per ili. *Sciŭ por vivi estas la plej granda scio!* La celo de la vivo estas la feliĉo; la vera feliĉo estas en la trankvilo de la koro kaj en la reciproka amo; ankaŭ la homan grandecon tiel ni taksas, kiom iu feliĉigis siajn homfratojn. La vivo estas malfacila nur por animmalriĉulo; la malesperanton karesu la scio, ke zorgema mano direktas nian sorton.

La hungara poŝto per eldono de poŝtmarko omaĝis je lia memoro.

Ĉi sube mi publikigas kelkajn el liaj fabloj en esperanta traduko, por utilo de miaj homfratoj en la tuta mondo.

La mirinda vojo de Dio

Iu homo hejmenirante trovis veturigiston, kiu penegis ĉe sia ŝarĝita ĉaro enmarĉiĝinta.

— Helpu min, homfrato! petegis la

veturigisto per malesperaj, petegaj vortoj. — Depost mateno mi vane baraktas ĉi tie. Dio benos vin, se vi helpos.

— Se mi sciis, respondis la vojaĝanto kun duba rideto. — Jam vesperigas kaj la proksimiĝanta vesperigo malhela ne montras trankvilan nokton: mia vilaĝo estas ankoraŭ malproksima, kaj mi timas la malfruigon.

Tamen li kompatis la malfeliĉulon kaj helpis levi la veturilon el la marĉo. Sed pro tio li malfruigis: la malhelo trafis lin en la arbaro. Li jam ne estis tre malproksime de sia loĝejo, kiam fulmotondro kaj pluvego devigis lin serĉi ŝirmejon en la kavo de iu maljuna arbo.

Kolere li pensadis tiam pri la «dibeno» de la veturigisto kaj li malbenis sin pro la propra mildkoreco.

Dume trankviligis la tempesto, kaj li vekigis el la dormetado je tre agrabla mateno. Frue li atingis la vilaĝon kaj trovis anstataŭ sia domo — fumajn ruinojn. Konsterniĝante li ĉirkaŭrigardis kaj terurite li vidis, kiel trafis la fulmo en la domon super lia lito kaj kiel ĝi estus mortbatinta lin, se li estus kuŝanta en ĝi.

Poste li komencis rekonstrui sian domon. Dum la laborado, kiam li levigis ŝtonegon, li ekvidis sub ĝi kavon. Li trovis en ĝi la trezoron de siaj prauloj, kion ili kaŝis tien dum pasintaj netrunkvilaj tempoj.

Vidante, ke lia perdo per riĉa rento estas repagita, li benis tiun momenton, kiam li helpis la malfeliĉulon kaj petis pardonon de Tiu, kies benon li iam malsaĝe povis dubi.

La aglo kaj la najtingalo

La aglo rigardis la najtingalon komplete el sia nesto, kiun ĝi konstruis sur la pinto de ĝisnubiĝinta kverko.

— Ho, kiel ĉiu venteto balancigas la neston de la najtingalo sur tiu malalta arbusto, ĝi pensis, kaj kiel

zorgema patrino, tremvoĉe ĝi alparolas la malgrandan birdon:

— Stultuleto! Kial vi ne venas por nesti en mian najbarecon, kie vi sekurite povus ekzisti?

Sed la kanta birdeto iumatene post terura ventblovado trovis la arbon en splitoj, la neston de la aglo rompita kaj mem la aglon mortinta.

— Ho, kiel bona estis, ĝi pensis, resti sur la malalta arbusto. La malalta arbusto balanciĝas, balanciĝas, sed la alta, forta arbo rompiĝas.

La maljuna poplo

La mastro decidis elhaki la maljunan kaj altan poplon.

La poplo ĝeme petis lin:

— Indulgu min! Mi estas ja maljuna, sed mia kresko estas plaĉe alta.

La mastro respondis:

— Kial mi indulgus vin? Ĉu vi donis fruktojn al mi? Ĉu vi donis ombbron al mi, al via posedanto, en varmeĝo de somero por dolĉa ripozo?

En maljunaĝo nur tiu ricevas estimon, kiu pasigis sian vivon por la utilo de aliaj.

La formikoj

Ĉe la riĉaj formikoj, kiuj loĝis en la ĝardeno de iu sinjoro, petegis por manĝaĵo la malsata grilo:

— Donu el via abundo por belartisto, kiu lulas viajn zorgojn en la forgeson per sia arto kaj serenigas viajn enuajn horojn.

La formikoj donacis al la peteganto.

Poste venis la melo.

— Donu ankaŭ al mi, kiu estas neprovizita. Rigardu, pro mia grasiĝo kaj mallerteco mi taŭgas por nenia laboro kaj pro tio mi povis kolekti nenan manĝaĵon.

La formikoj kompatis ĝin kaj donis al ĝi manĝaĵon.

Afable venis poste la muso kaj parolis jene:

— Ĉu vi scias, amikoj, kion mi volas diri al vi? Nia sinjoro, en kies ĉambromuro estas mia kaverno, decidis pri via mortigo. Mi aŭskultis, ke li volas mortigi vin per varmega akvo. Sed, se vi donos al mi, nun tre malriĉa, el via riĉa trezoro, mi parolos kun li pro via intereso. Kaj mi certigas vin, ke via nesto restos.

Ho, kion ili ne estus donintaj por la promesita subteno!

La rato ne maltrankviligis per peto, sed ĝi stelis de ili.

Kiam la prirabitoj rimarkis la malmultiĝon de la kolektaĵo, ili invitis por helpi la bravan hamstron. Ĝi brave forpelis la ŝteliston, sed ĝi preskaŭ ĉiun nutraĵon de la mallertaj formikoj forportis, kiel militan kapt-aĵon.

Tiam la formikoj ĝemis: Ho, Dio, kiel malfacile estas vivi por la diligentularo en socio, kiu enhavas multe da maldiligentuloj!

La aglo kaj la aliaj birdoj

Ĉiu birdo volis imiti la aglon, la reĝon de la birdoj.

— Eble pro tio ĝi estas tiel forta, ĉar ĝi nutras sin per viando. En la viando estas pli da fortigilo ol en la aĉa grajno, diris la ansero kaj la malsaĝa komencis manĝi nur viandon kaj preskaŭ ĝi malsatmortis.

— Malmulton trinkas ĝia reĝa moŝto, eble en tio estas la sekreto, diris la pelikano kaj heroe ĝi suferis la soifon, ĝis kiam ĝi svenete kliniĝis.

— En la kurba beko estas ĝia kuraĝo, diris la cikonio, kaj per ŝtonoj ĝi kurbigis sian bekon, tiel, ke poste ĝi povis nek manĝi, nek trinki.

La pigo estis sufiĉe saĝa por konstati, ke la forton ĝi ne povas ellerni de la aglo.

— Sed nepre mi ellernos ĝian seri-

ozan intencon, kiu majestigas ĝin kaj ĝian silentemon, kiu estas la eco de nur grandaj animoj, parolis la pigo, kaj kun saĝa mieno ĝi eksidis sur arbo, imitante grandan seriozon.

La ceteraj birdoj anstataŭ estimo priridis kaj mokis ĝin:

— Al via arlakena vestaĵo ne decas saĝo, diris la birdoj al ĝi.

— Vi estas pravaj, parolis la pigo, trovinte ĝustajn vortojn kaj saĝon.

— Amikoj, mi jam scias, kio estas la sekreto de la aglo.

— Nu, kio? demandis la aliaj.

— Tio, ke ĝi naskiĝis kiel aglo kaj ni kiel aliaj birdoj.

La ĉevalo, kiu havis flugilojn

Aglo flugis super la fajrosanga ĉevalido.

— Ho, se mi havus flugilojn, mi tranĉus la aeron de noktmezo ĝis tagmezo, kaj de oriento ĝis okcidento, diris ĝemsopire la ĉevalido.

— Lasu, mia filo, diris al ĝi la patrino, — vi havis praulon, kiu posedis flugilojn, ĝi estis la pia Pegazo, sed ankaŭ ĝin mortajdis la multaj friponoj.

La hirundo

Malbona infano detruis la neston de la hirundo.

— Mi malamas, forlasas la kruelan mondon, ĝi diris kun patrino doloro. — Mi flugos en la arbaron, kien ne venos post mi la malamo de la malbonaj homoj, kaj mi estos ermito ĝis la morto.

Tiel ĝi agis kaj vagante en la densa arbaro, ĝi ĝemadis kune kun la malgaja turto.

— Kio pelis vin ĉi tien? demandis komplete el la mezo de la arbusto la malgranda najtingalo. — Via loĝejo estas inter la homoj.

Responde torentis la plendo el la buŝo de la hirundo.

— Amikino, parolis afable la kanta birdo, — se ĉiu, kiu iam suferis maljustaĵon, forkurus el la socio, ĝi tute disfalus. Rigardu: antaŭ du jaroj miaj idoj fariĝis viktimoj de la korvo; pasintjare birdkaptisto kaptis miajn idojn kaj ili eĉ nun estas enkaŝigitaj. Kaj tamen ankaŭ ĉijare mi kun bona espero konstruis denove la neston. Se mia konsolo plaĉas al vi, reiru inter la homojn, kiuj nur pro malsaĝeco agis kontraŭ vi kaj rekonstruu vian neston rapide, por ke la vintro ne pli frue forpelu vin.

La juna gruo

Aŭtune trupon da grupoj gvidis la plej maljuna gruo. Malrapide, sed konstante progresis ĉiam pli antaŭen ilia kojno. Tamen la pli junaj komencis malpacientiĝi pro la malrapida progreso.

— Onklo, permesu, ke mi gvidu la kojnon, petis la plej agema, — estos eĉ fino de la vintro, kiam ni atingos nian hejmon.

Transpreninte la gvidon, rapidege flugis antaŭen la grupo; sed post ne longa tempo la gvidanto tiel komencis laciĝi, ke lia fajro estingiĝis kaj sentis premon en sia brusto.

— Kara onklo, reprenu la gvidadon, ĝi petegis al la maljuna gruo, — mi vidas, ke la junulo estas taŭga nur por freŝa, vigla agado, sed ĉe la gvidilo de la konstantan forton bezonanta laboro estu sperta maljunulo.

Szalay Sándor.

Norvegaj eldonaĵoj mankas el Hamb.

Ne nur la Norvega Esperantisto, sed ĝenerale la norvegaj esperantaĵoj mankas el nia biblioteko. Ĉu iu norvega samideano povos helpi? Se jes, jen nia adreso: Hungarlanda Esperanto-Muzeo kaj Biblioteko, Szeged p.f. 441, Hungario.

Kun koraj antaŭdankoj.

La Danuba insulo "Esperanto"

Esperantujo ekzistas nur image, sed Esperanto-insulo ekzistas reale. Jen ĝia historieto.

Antaŭ kvindek da jaroj, proksime de la bulgara urbo Orjaĥovo, en orienta direkto, en la akvoj de la blua Danubo ekaperis malgranda sabla insulo. La fabelo ŝajnis esti miraklo. Iom post iom la insulo kreskis laŭ ĉiuj direktoj, fariĝante alloga publika promenejo. La unuaj konkerantoj de la senmastra teritorio en 1925 estis la membroj de la loka esperantista societo «D.ro Zamenhof». Kaj pro la oftaj vizitoj de la esperantistoj oni baptis ĝin «Esperanto». Kaj en 1930 la komunumo en Orjaĥovo per kontrakto, kiu validas 20 jarojn, cedis la insulon al la esperantistoj. Laŭ la sama kontrakto la insulo ricevis la nomon «Esperanto». La novaj posedantoj en mallonga tempo konstruis sur ĝia tereno turistan domon, lunĉejon, puton, transformante la insulon en agrablan ripozejon por la loĝantoj de Orjaĥovo. Sekve de tiu evento, alvenis en la komunumon pluraj leteroj de la gesperantistoj el la tuta mondo. En la lokaj gazetoj aperis artikoloj de kuracistoj. Pluraj malsanuloj de reŭmatismo resaniĝis. La insulo estiĝis fama — jam komencis alveni ekinterestigataj personoj de proksime kaj malproksime. Ne sufiĉis jam la transportiloj. La tumulto, la kanzonoj, kaj la fajroj atentigis la preternaĝantajjn ŝipojn, kiuj lumigis la insulon per siaj lumjetiloj.

En 1934 en Orjaĥovo kunsidis la 21a Bulgara Esperanto-kongreso. Laŭ la komuna decido de la kongresanoj oni kunsidis unu tagon sur la insulo. Tiu kongreso estis vizitata ankaŭ de

pluraj eksterlandaj samideanoj, kiuj admiris la naturan ĉarmon de tiu unika esperantista teritorio.

Dum la faŝistaj reĝimoj la insulo tre ofte estis kaŝloko por antifaŝista agado, kunvenoj, kunsidoj, organizitaj sub la ŝajna formo de junularaj ekskursoj.

Taksante la avantaĝojn de la rivera akvo, la arĝentan sablon, la bongustan akvon de la proksima fonto «Kapitanec», la abundon de fruktoj k. a. la bulgara popola reĝimo entreprenis la konstruon de somerrestadeja komplekso «Esperanto» sur la dekstra bordo de rivero Danubo, vid-al-vido al la insulo. Baldaŭ en la vitkampoj estos konstruita la plej granda bulgara apudrivera somertendaro kun multaj konstruaĵoj en moderna arkitektura stilo. En ĝi estos inkluzivitaj la ripozdomoj por la agrikulturaj kooperativoj, por la laboristoj de la celulozfabriko, de la maŝintraktora stacio kaj de la cetera industrio, la fruktokuraca sanatorio, plaĝaj aranĝoj, sportaj ekipaĵoj, privataj vilaoj, jaĥtoklubo k. a.

Sur la naturforma teraso jam vidigas la nova konstruaĵo de la impona turista hotelo kun luksa restoracio, komforte meblitaj ĉambroj kun 80 litoj.

La insulo «Esperanto» estiĝas alloga plaĝo, kiu baldaŭ svarmos pro amaso da somerumantoj kaj amatoroj de akvosporto. Ĝia nomo senĉese fluŝos al ili pri nia movado.

*Nedjalka Cankova
Blago Dimitrov
str. Kazanliška 160,
Ĉirpan, Bulgario*

Korespondu!

Usonano dez. kor./interŝanĝi desegn/pentristaj artoj. Ankaŭ interesos pri fotografio. D. W. Hoffman, 1444 Leslie street Hillside, N.J. 07205, U.S.A.

Norvega Kroniko

Red.: Karsten Langsholt

Klubo Esperantista en Oslo.

1/4. Nanna Fridrichsen rakontis pri sia vizito en Svisujo kaj montris multajn belajn kolorlumbildojn kaj poŝtkartojn de vilaĝoj, montoj kaj glaciejoj. Ŝi ankaŭ ludis tipan svisan muzikon kun jodlo. La prez. dankis ŝin pro la tre interesa prelego pri tiu lando kiun ni ĉiuj esperas iam viziti.

Antaŭ la prelego la Kluba Kantgrupo gvidata de Brynhild Østmo prezentis tre vigan kaj bonhumoran svisan popolkanton «Weggiser Lied».

Carl Støp-Bowitz havis tre gravan novaĵon: N.E.L. ricevis leteron de la Ministerio de Eklezio kaj Edukado ke ĝi aprobis eksperimentan instruadon de Esperanto en la lernejoj. Bedaŭrinde — la letero portis la daton . . . unuan de aprilo!

Otto Prytz prezentis la programpunkton «La Voĉo de la Majstro — surpriza eltrovaĵo». Ni aŭdis per sonbendo intervjuon inter La Majstro kaj germana ĵurnalisto en 1914. Estus sensacia memoraĵo pri nia Majstro se la intervjuo — okaze de la tago — ne estus farita inter Thor Magnus Carlsen kaj Otto Prytz.

26/4. Post la bonvenaluto de la vicprez. Otto Prytz, la sekretario raportanta legis la raportojn pri la klubkunvenoj 15/3 kaj 1/4, kiuj estis aprobatataj.

Dum la 10-minuta lingva instruado Astrid Mansrud klarigis pri la diferenco inter «de» kaj «da». Ŝi ankaŭ aktivigis la membrojn kaj la dialogo pri lingvaj problemoj estis vigla kaj interesa.

Tom Arbo Høeg legis sian tradukon de la ĉarma poemo de André Bjerke «ARKO ĈIELA». Li diris ke oni devas esti poeto kaj samtempe lerta esper-

antisto por traduki poemojn. Montrigis ke Tom Arbo Høeg havas ambaŭ kvalitojn. Li kaptis la spiriton de la poemo kaj sukcesis redoni ĝin Esperantlingve. La vicprezidanto dankis por la eminenta traduko.

Dum la klubkunveno 6/5 Otto Prytz prelegis pri «Popolmuziko tra la tuta mondo». Pere de sonbendo li ludis melodiojn el multaj diversaj landoj en Eŭropo, Azio, Afriko kaj Ameriko. Li finis per 3 parodioj de popolmuziko kantitaj de Peter Ustinov — rusa, norvega kaj hispana — tre amuzaj.

Komence Otto Prytz diris ke la programo devis esti prezentita de fakulo pri muziko — li nur estas amatoro kun muziko kiel ŝatokupo. La forta aplaŭdo montris ke la aŭskultantoj tre alte taksis la «amator-aĵon». La prez. dankis kaj konstatis ke Otto Prytz ĉiam havas interesajn kaj indajn prelegojn. — Otto Prytz ankaŭ gvidis tre amuzan divenkonkurson: el 11 frazoj la partoprenantoj estis petataj trovi 12 korpopartojn. L. Anjer kaj C. Støp-Bowitz gajnis la premion, skatolon da ĉokolado, la enhavon de kiu ili bonkore disdonis al la ĉeestantoj.

C. Støp-Bowitz donis kelkajn sciigojn, interalie la tre ĝojan informon ke N.E.L. nun fine sukcesis ekhavi novan pli grandspacan oficejon en Sŝ. Olavsgt. Kompreneble, la nova oficejo kostas monon, kaj li apelaciis al la membroj ke ĉiuj laŭ kapablo subtenu la kontorfondaĵon.

Ekskurso al Arhus perŝipe 8an—10an de majo 1965.

Sabaton la 8an de majo je la horo 16.00 la partoprenantoj enŝipiĝis en «Holger Danske» por fari semajnfinan ekskurson al Arhus.

Ni trovis niajn kajutojn, kaj ĉar la suno brilis kaj la maro montris sian plej kvietan vizaĝon, ni sidis sur la

ferdeko ĝuantaj la belan veteron. — Poste ni manĝis en la restoracio, trinkis kafon k.t.p. en la fumsalono, kaj fine dancis.

Bedaŭrinde la vetero ne estis same bona kiam ni forlasis la ŝipon dimanĉon matene, sed aŭtobusoj staris sur la kajo, kaj multaj partoprenis rondvojaĝon en la urbo Arhus, kaj pli multaj ekskurso al Ebeltoft, Mols. La ŝoforo-gvidisto tre bone kaj humorplene klarigis pri la vidindaĵoj — precipe en Mols li interŝutis multajn anekdotojn pri la stultaj, stultaj enloĝantoj de Mols. En Ebeltoft — tre ĉarma urbeto — ni manĝis ege bongustan kaj abundan lunĉon. — Posttagmeze ĉesis la pluvo kaj kelkaj sunbriletoj trapasis la nubojn.

Surŝipe estis ebleco aĉeti ĉokoladon, cigaredojn k.t.p. je tre favora prezo, kaj kompreneble ni kaptis la okazon havigi al ni tiajn ŝatatajn aĵojn. — La vesperon ni pasigis laŭplaĉe en la salonoj — babilante, dancante ktp. Tre populara estis la nova danco «Yenka» — renovigita finna popoldanco.

Lunde matene je la horo 8.30 ni alvenis al Oslo, kaj tiam la suno denove brilis.

La ekskurso estis tre sukcesa, kaj mi havis la impreson ke la partoprenantoj povas imagi al si partoprenon en sama aŭ simila aranĝo. Entute partoprenis 20 personoj.

La Urso, Sarpsborg,

kunvenis 1/4. Pro la 50-a UK en Tokio oni aranĝis japanan vesperon. La japana ambasadoro en Oslo bonvole disponigis belajn afiŝojn kun japanaj pejzaĝoj, aron da paperaj lanternoj kaj pupon. Nia membro Stig-Otto Forsberg kunportis multegajn japanajn objektojn, vestaĵojn, tasojn, vazojn. Tiamaniere la kunvenejo estis riĉe ornamita. Unue la prezidanto informis pri la Universala

Kongreso en Tokio kaj pri la Esperanto-movado en Japanujo. Poste s.ro Forsberg tre interese rakontis pri la uzo de la diversaj kunportitaj objektoj, kaj per aro da koloraj lumbildoj donis al ni impreson pri la lando kaj la popolo kaj ankaŭ pri siaj travivaĵoj en Japanujo.

29/4 la klubo okazigis la lastan antaŭsomoran kunvenon. En tiu kunveno nia membronombro atingis la ciferon de la pasinta jaro, kaj ni kontente konstata, ke ni almenaŭ ne plu malkreskis. La ĉefa programero estis prelego de J. Hammond Rosbach pri Romo, ĉifoje precipe pri la Vatikano — kun granda nombro da lumbildoj.

La Esperantoklubo de Bergen.

kunvenis 25/3. «La vortojn de la monato» prezentis Jenny Dahl, kiu legis «La loĝdometo de Mette».

La sekr. legis raporton pri la kunveno de «F.N.sambandet på Vestlandet», kiu okazis en Hotell Norge, kaj du el niaj membroj reprezentis nian klubon en tiu kunveno,

Nelly Bjørge Nilsen rakontis pri impresoj dum sia restado en Anglujo, kie ŝi partoprenis kunvenojn en esperantokluboj, inter aliaj en Bradford kaj Keightley, kaj pri vizitoj en privataj esp. hejmoj. — Elsa Njøten legis versojn «Antaŭmaja nokto», «Plorkanto», «Amo kaj malsaĝaĵo», kaj «Kanteto pri vortoj». — El la finna klubĵurnalo «Informilo» Doris Birkelund legis leteron senditan el Bergen, kaj la redaktoran respondon. La postan tagon nia populara membro Kjell Offerdal celebris sian 50jaran naskiĝtagon, kaj la prez. per bonelektitaj vortoj honoris nian fidelan, aktivan membron. — Kjell Offerdal dankis pro la belaj vortoj, kaj, pro la multaj esp.kunestoj dum jaroj, kaj li invitis la ĉeestantojn al sia hejmo la postan tagon. — Jenny Jahren

kaj transdonis al ŝi la norveglingvan libron pri Zamenhof.

La Norda Lumo, Tromsø,

malfermis la novan jarlaboron en la hejmo de la prezidanto 3/2. — La prez., s-ro H. Olsen, raportis pri la studrondo en B.U.L. ĉiurbe.

17/2. Oni renkontiĝis ĉe Saxer J. Ebeltoft, kie oni komencis la propran preparon en la lingvouzo.

3/3. Ni renkontiĝis ĉe s-ro R. Holm, kiu denove aniĝis al la klubo. Tie ankaŭ estis invitataj 2 aliaj malnovaj anoj de la klubo. — La duonhoran lingvopraktikadon ni ne forgesis. — Fine ni kuniĝis ĉirkaŭ delikata kofotablo.

25/3. Anoncita malferma kunveno okazigis en la kafejo Sagatun. Al ĉi tiu kunveno estis invititaj geinterestitoj, malnovaj kaj novaj esperantistoj, sed venis nur du el la studrondo de B.U.L.

prezentis multajn kantojn, verkitajn kaj tradukitajn de Offerdal, kaj ni unisone kantis ilin. Thora Horntvedt plane akompanis.

22/4. Kristian Sivertsen prezentis «La vortojn de la monato». Li legis versojn pri «Kaktoj», «Bergena Printempo» de Henrik Jansen, kaj finis per pli moderna poezia verko «La vakspupo». — La prez. Elsa Njøten legis printempan verkon, kaj pri sia restado dum la Pasko. — Kjell Offerdal intervjuis la ĉeestantojn pri iliaj travivaĵoj dum la pasko, kaj laŭvice ili respondis kaj rakontis. — Doris Birkelund legis de la finna «Informilo» pri la laboro tie por varbi membrojn. La rezultoj de la varbado estis bonaj. — Aashild Birkenes proponis ekde nun pripensi la aŭtunan propagandlaboron kaj kiel prepari kursojn. Tiu okazigis diskuton.

Leonora Sivertsen detale informis pri la aranĝo de Okc. Distrikto en Hogganvik kaj denove tenis la membrojn aliĝi.

Grupo Esperantista, Trondheim.

16/3. Malfermite la kunvenon, la prezid. povis bonvensaluti 21 partoprenantojn. Specialajn bonvensalutojn li direktis al s.ino Ingrid Arnesen kiu estis la vespera paroladanto. — S.ro Næss ekhavis la parolrajton kaj donis pliajn informojn pri la kongreso de IFEF, okazonta en Hamar ĉisomere. — S.ino Arnesen faris unuhoran tre interesan paroladon pri vojaĝo al Jerusalemo dum la pasko en 1964, kaj pri la grandaj kaj belaj moskeoj kaj la aliaj monumentoj en tiu historia urbo. Akompane al la parolado ŝi montris lumbildojn. — La prezidanto dankis ŝin pro la interesa programero

Norsk Esperanto-Forbund (Norvega Esperantista Ligo)

Postadresse: Boks 942, Oslo. Postgiro 100.30
Kontoradresse: Nedre Slottsgt. 3 III, Oslo
Telefon: 42 47 79
Kontortid: Tirsdag og fredag 15.30—16.30

Turisma Servo: Boks 942, Oslo.
Postgiro 100.32

Esperantoforlaget A/s (Eldonejo Esperanto A/s)

Postadresse: Boks 942, Oslo. Postgiro 100.31
Kontoradresse: Nedre Slottsgt. 3 III, Oslo
Telefon: 42 47 79

Ĉefdelegito de U. E. A.:

S-ro Alfred Skyberg, Østensjøvn. 118 a,
Oslo-Bryn. Postgiro 133.29

La redakcio:

Privata adreso de la ĉefredaktoro:
Johan Hammond Rosbach,
C. E. Holters vel 7C, Sarpsborg: - Uzu tiun
adreson, kiam temas pri urĝaj sendaĵoj.
Telefona: 547 27